## FRANCA KRONIKO

### FEDERACIO DE LA PARIZA REGIONO

*Aulnay-sous-Bois.* — S-ro Thomas gvidos kurson.

*Bois-Colombes.* — S-ro Capdeboscq gvidos kurson komence de novembro ĉe Association Philotechnique, rue Ch. Duflos.

*Drancy.* — S-roj Vabre kaj Gladieux malfermos du kursojn, komence de novembro en Ecole du Centre.

*Les Lilas.* — Ĉiumerkrede vespere, S-ro Briot gvidos kurson ek de novembro ĉe Ecole de garçons, avenue Waldeck-Rousseau.

*Malakoff.* — Afiŝoj anoncos la kurson, kiun malfermos S-ro Pâris komence de novembro.

*Rosny-sous-Bois.* — « **Balo de Esperanto** » okazos la 6-an de Oktobro. Ĉiumarde ekde la 3o-a de oktobro kurso gvidata de S-ro Aubry en Ecole des garçons.

*Saint-Denis.* — S-ro Melotte gvidos kurson, pliaj informoj sekvos.

*Versailles.* — Kurso gvidata de S-ro Chilard komenciĝos en novembro en Ecole, rue Saint-Simon.

### FEDERACIO DE LA NORDA REGIONO

*Amiens.* — S-ro Leger, sekretario de la grupo sukcesis instali esp-o-budon en la ekspozicio « Plein air et Camping » organizita de diversaj kampadaj kaj turismaj asocioj. La dejorintoj ĉe la budo konstatis ke scivolemo pri nia lingvo estas ĉiam vigla.

S-ro Bettembos, policisto, ricevis oficialan permeson surporti nian insignon.

*Poix.* — S-ro Irlande, arestita de la Gestapo en 1941 kaj pri kiu ni ne havis novaĵojn, feliĉe revenis.

*Saint Omer.* — S-ro E. Deligny, kies nova adreso estas, 40, rue de Valbelle, malfermos kurson la 6-an de oktobro, tiu kurso okazos ĉiusabate, kelkaj lernontoj jam enskribiĝis. Poste S-ro E. Deligny provos renaskigi la grupon.

### FEDERACIO DE NORMANDA REGIONO

*Le Havre.* — Kreskas rapide la tiea movado malgraŭ malfacila postmilita kondiĉaro. Publika senpaga kurso gvidata de F-ino Amiard kunvenigas ĉiusabate multajn gelernantojn. La komitato 1945 konsistas el Prezidanto : S-ro Bosc, vicprezidanto : S-ro Dubuisson, kasistino : F-ino Perennou, bibliotekistino : F-ino Poursain-Delegito de L.-E.-L. : S-ro Bosc.

### FEDERACIO DE LA OKCIDENTA REGIONO

*Nantes.* — Invitite de la Federacio, S-ino Haudebine gvidos ĉe kursojn en Nantes, Angers, Sablé-sur-Sarthe, Le Mans, komence de Novembro.

### FEDERACIO DE LA CENTRA REGIONO

*Limoges.* — F-ino J. Artigaud, 3, rue des Ursulines en Limoges. C. C. P. Limoges 702.79 estas nun nova sekretariino de la Federacio. Ŝi petas ke ĉiuj grupoj sendu kiel eble plej rapide al ŝi liston de sia membraro kaj la nomojn kaj adresojn de la prezidantoj aŭ sekretarioj. La Federacia Kongreso okazos en Limoges, meze de septembro.

*Niort.* — S-ro J. Thézard, 25, rue Terraudière sciigas ke la grupo denove aktiviĝas.

### FEDERACIO DE LA PROVENCA REGIONO

*Arles.* — Dum la Federacia Kongreso, S-ro Louis Laget, 10, Rond-Point des Arênes en Arles. C. C. P. 109-89 Marseille, elektiĝis ĝenerala sekretario-kasisto de la Federacio. Estas petate rilate rekte al li por la kotizoj.

### FEDERACIO DE LANGUEDOC-ROUSSILLON

*Balaruc-les-Bains.* — Dank' al S-ro Lentaigne la esp-ista semajno havis grandan sukceson, tie oni parolis Esperanton... kaj nur Esperanton. 40, parto-prenintoj el kiuj multaj instruistoj kaj Junul-gastej-anoj.

*Perpignan.* — Pli ol 3oo petoj aliĝi al senpaga koresponda kurso ricevis la nelacigebla Federacia Prez. S-ro Llech-Walter sekve de artikolo en la loka gazetaro. S-ino D-rino Odile Kirchacker plenumis grandan laboran korektante ĉiujn taskojn.

## NEKROLOGO

Kun profundo ĉagreno ni devas sciigi ke la antaŭtimo pri pliaj mankoj inter niaj vicoj, esprimita de F-ino C. Royer en nia Sept. Okt.-numero, bedaŭrinde realiĝis.

Por la Libereco oferdonis sian vivon :

René Pellet, arestita kaj mortpafita de la Gestapo 23-8-44. Georges Roche, internigita de la Gestapo dum okt. 1942, eskapinta en marto 1943 kaj aliĝinta al la sekreta franca armeo glore falis en Marseille la 23-8-44. Roger Violi, arestita de la Gestapo kaj mortpafita la 24-11-43. André Claudy, mortpafita de la Gestapo. Pierre Vieillard, 20 jara studento en Normala Lernejo Jean Creux, 18-jara kaj lia frato Robert Creux 30-jara, ĉiuj 3 lastaj fervoraj membroj de la grupo de Dijon estis mortpafitaj de la Gestapo en 1942. S-ro Faivre, Prez. de la grupo de Pontarlier la 5-9-44.

Pro militagoj estis mortigitaj :

S-ro Auguste Marchand, Ges-roj Larroque (Sotteville), S-ino Irlande (Poix).

Al tiu listo jam tro longa ni devas aldoni la nomojn de S-ro Segretinat (Bourges). S-ino de Lajarte (Paris). F-ino Le Blanc (Paris). Giraud (Aix-en-Provence). Jacques Houzelot (Besançon). S-ino Devaux (Amiens). S-ro Couffinhal (Labarthe de Nestе). S-ro Gabriel Desray (Paris). S-ro René Deshays (Marseille) malnova pioniro. Michelis di Rienzi Honora prez. de A. E. P. T. T.

S-ro Charles Duris, Honora Prez. de la grupo de Limoges, kaj de nia malnova eminentulo, profesoro ĉe la Konservatorio de Artoj kaj Métioj Raoul Bricard, iama Prez. de la Pariza grupo kaj aŭtoro de la Matematika Terminaro kaj Krestomatio.

Ni menciu ankaŭ ke la fama franca verkisto Romain Rolland, kies morton kruele sentas la tutmonda intelektularo, estas perdo de varma amiko por la esperantistaro.

S-ro Eugen Heintzeler, aŭtoro de la projekto de *L. I. Universala* mortis subite en Stuttgart.

Ni estis informitaj pri la morto, subite okazinta, de nia bona samideano Raymond Couteaux, konsilisto de la apelacia Kortumo kaj Prezidanto ĉe la Justeca Kortumo de Paris.

S-ro R. Couteaux estis la frato de nia prezidanto. Li estis partopreninta en la rezistada movado kaj estis laciĝinta dum pluraj jaroj. Kun lia edzino, li apartenis al la pariza grupo, kaj estis ĉeestinta la Bernan internacian kongreson.

Eminenta juristo, li ŝajnis alvokita al plej altaj funkcioj. Nia movado kaj la tut-lando sentos multe la gravan perdon faritan. Lia edzino kaj lia tuta familio bonvolu akcepti ĉi-tie nian plej sinceran kondolencon.

Fine, ni eksciis kun doloro ke S-ro Grenkamp-Kornfeld, nia fama verkisto kaj vortaristo, estis mortigita en Germanujo, post kruela turmentado. Saman sorton trafis S-ro Guy Borel, arestita de la Gestapo la 18-10-40.